La 11-an de Marto okazis en Madrido kunveno por prepari la venontan HEF-kongreson kaj novan HEF-estraron. La renkontiĝo daŭris la tutan tagon kaj dum kelkaj momentoj ĉeestis pli ol 30 personoj, precipe de Madrido. Ankaŭ venis gerepresentantoj de la grupoj de Santiago de Compostela, Valladolid, Barcelona, Sevilla, Màlaga, Badajoz, Santander kaj Zaragoza. La ĉefa temo estis la nova HEF-estraro, kiu provizore estas jena: prezidanto, sinjoro A. Alonso Nùñez; sekretario, sinjoro A. Franco; kaj vicprezidanto, sinjoro Manuel, de Sevilla. Kompreneble mankas ankoraŭ gekandidatoj por aliaj gravaj geestraranoj, kiel: kasist(in)o, redaktor(in)o de Boletìn, aŭ komisiist(in)o pri publikaj rilatoj kaj propagando. Ankaŭ oni devas revizii la statutojn, ĉar, laŭ ili, la prezidanto kaj la sekretario devas loĝi proksime. Alia grava punkto por solvi antaŭ la kongreso, devos esti la agad-plano kaj la buĝeto de HEF, kiu ne devas elspezi nur por la eldono de Boletìn (sinjoro Botella oferis sin por trovi malmultekostan presejon en Zaragoza).

NOVAJ BAZAJ KURSOJ DE ESPERANTO.

Juan Antonio Castillo organizis kurson de Esperanto en la Kultura Centro de Mòstoles. Li instruas pli ol dudek gekomencantojn, kiuj ni esperas, ke finos la kurson.

Krome, laŭ la slogano "La reloj unuiĝas landojn, Esperanto popolojn", sinjoro Tomàs Ortiz inaŭguris kurson en "El Hogar del Pensionista Ferroviario" (Estaciòn Norte). La kurso estas senpaga, kaj okazas lunde, merkrede kaj ĵaude, ekde la 19-a horo kaj duono, ĝis la 21-a horo.

HEF OFICEJO.

Pro la klopodoj de Lucrecia San Antonio kaj la helpo de kutimaj geesperantistoj kiuj kunvenas en Rodrìguez San Pedro 13, la oficejo de HEF reviglìĝas. Okazas kurso marde kaj ĵaude, ekde la 19-a horo ĝis la 20-a horo, kaj post la klaso oni faras konversacian rondon. Unu el la gelernantoj, sinjoro Fernando Moral, pluigas la sidejon kaj deĵoras kelkajn horojn por respondi telefone kaj informi. Nun, nur mankas, ke HEF apogu ekonomie sian oficejon de Madrido! (Ekde ĝia aĉetado, la kostoj de la oficejo estas pagita de kelkaj gemadridanoj -ne multaj.) La plej grava enspezo estas la kristnaska loterio, kiu kutime ne sufiĉas.

UNU HORAN PROGRAMON EN RADIO POPULAR.

La radiostacio COPE elsendis, la pasintan 8-an de Marto, interesan programon pri Esperanto, pro la klopodoj de sinjoro Arranz, kiun ni rekaptis por la Madrida E-movado. Oni intervjuis en Madrido sinjoron Miguel Fernàndez kaj Francisco Zurita, kaj en Barcelono sinjoron Aragay. Dum la elsendo, oni parolis telefone kun samideaninoj el Norvegio kaj Australio kaj samideanoj el Hispanio.

MIGUEL FERNANDEZ PRELEGOS EN BULGARIO.

La Somera Universitato en Pisanica invitis sinjoron Miguel Fernàndez prelegi en siaj someraj kursoj. Li parolados pri hispana literaturo, speciale pri la verkoj de Lorca kaj Miguel Hernàndez, kiujn li ĵus tradukis.

PETAS HELPON POR GASTIGI EN OKTOBRO.

niaj gesamideanoj de Elche (Antonio Verdú), tri gepolojn, kiuj deziras resti kelktagojn en Madrido. Interesataj personoj bonvolu adresi al: Apartado 22, 03280 ELCHE (Alicante).

41-A IFEF-KONGRESO

okazos ekde la 13-a ĝis la 19-a de Majo (pontofesto). En la Internacia Fervojista Kongreso eble partoprenos ĉirkaŭ kvincent gekongresanoj. Vi profitu la okazon partopreni Internacian Kongreson en Hispanio!

49-A HISPANA KONGRESO

okazos ĉe Bilbao, ekde la 19-a ĝis la 23-a de Julio. Finfine LKK akceptis longigi la programon ĝis la dimanĉo. La sabaton okazos la ĝenerala kunveno de HEF, la oficiala fermo kaj la bankedo; la dimanĉon, ekskurso al Gerniko.

RONDO ĈE ATENEO.

ĉiumonate, la trian merkredon, je la 19 horo, okazas konversacia rondo en Ateneo de Madrid (s/Prado 21). En Marto kunvenis pli ol dek geesperantistoj de la diversaj grupoj de Madrido: Liceo, Fuente Toledo, Rodríguez San Pedro, Maestro Alonso; kaj ankaŭ de Segovia. Ni denove rekomendas al ĉiuj partopreni unu fojon monate en ĉi tiu rondo: la loko estas komforta, la etoso vigla, kaj oni povas montri al ne-esperantistoj la utilecon de Esperanto.

VENONTAJ PROGRAMOJ:

La 8-an de Majo: prelego "Velàzquez", de Pilar Menèndez, je la 19-a horo.

La 17-an de Majo: konversacia rondo "Amigos del Esperanto" ĉe Ateneo (s/Prado 21), je la 19-a horo.

LASTMOMENTA INFORMO

Ĵus alvenis al nia redakciejo malbonan novaĵon: S-ro Azorin Poch forpasis en Madrido. Li esperantiĝis kiam nur estis naŭ-jaraĝa kaj aktive laboris en nia movado. Pace ripozu.

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº98. MADRID - 28012

Salio 18/6/89

# NIA VOĈO

175 ekzempleroj    Organo de Madrida Esperanto Liceo    Junio 1989

## SUBVENCIOJ

MEL petis subvenciojn al aŭtonoma komunumo de Madrido (kultura konsilantaro) kaj al urbodomo de Madrido (kultura sekcio). Ni esperas atingi almenaŭ unu el ili.

## DONACO DE "FUNDACION ESPERANTO"

Je la nomo de "Fundaciòn Esperanto" MEL donacis ekzempleron de la esperanta traduko de "Don Kiĥoto", farita de Fernando de Diego, al la "Sociedad Cervantina Madrileña". Lucrecia San Antonio legis kelkajn vortojn pri la internacia lingvo kaj la universala verko de Cervantes.

## KONGRESLIBROJ SERĈATAJ

Hispana Esperanto Muzeo ne havas en sia kolekto la Kongreslibrojn de la jaroj 1926 kaj 1932. Ambaŭ kongresoj okazis en Madrido. Ni petas al ĉiuj esperantaj grupoj, kiuj havas ekzemplerojn de tiuj libroj en sia biblioteko, bonvolu sendi fotokopiojn al S-ro Hernàndez Yzal. MEL pagos la kostojn de tiu sendo.

## LORCA KAJ ESPERANTO

En aprilo, la granada Diputacio organizis akton en la domo-muzeo de Lorca, en la vilaĝo "Fuente Vaqueros", okaze de la donaco de tri verkoj de Federico García Lorca tradukitaj al Esperanto. Tiun akton partoprenis kelkaj geesperantistoj el Andaluzio, kaj oni prelegis kelkajn vortojn de nia membro Miguel Fernàndez Martìn, tradukinto de du verkoj de Lorca.

## EXPO-LINGUA89

Duafoje okazis en Madrido kongres-ekspozicio pri lingvo-lernado. Bedaŭrinde Esperanto ne ĉeestis. La evento estis tre interesa, kaj Lupe, kiu vizitis la ekspozicion, rekomendas al HEF lui standon la venontan jaron.

## KURSOJ DE ESPERANTO

Tiun ĉi jaron okazis en Madrido diversaj kursoj, per kiuj Esperanto disvastiĝis en kvartaloj kaj vilaĝoj:

-Atocha 98: Pedro Garrote instruis per "EK" metodo; la kurson finis sukcese ses gelernantoj.

-Rodrìguez San Pedro 13: Lucrecia San Antonio daŭrigis sian kurson por komencantoj.

-Estaciòn del Norte: laŭ aŭspicio de la Fervojista Asocio pri geemerituloj, Tomàs Ortiz organizis bazan kurson, kies profesoro estis Fernando Moral, kaj la nombro da gelernantoj, pli malpli, dekses.

-Kultura Centro de Mòstoles: ĵus komencis en tiu madridana vilaĝo baza kurso, kiun gvidis Juan Antonio Castillo. Unufoje semajne preskaŭ dudek gelernantoj partoprenas tiun kurson.

-Segovio: S-ro Moisteyrìn daŭrigis sian instruadon en tiu urbo: siaj gelernantoj kelkfoje vizitis la esperantajn rondojn en Madrido.

## MEMBRARO DE UEA

Dum 1988 UEA havis entute 43148 membrojn, el kiuj 1081 loĝas en Hispanio. Tiu nombro ne estas tro alta por universala asocio.

## NOVA REDAKTORO-TAJPISTO

La pasintan monaton aperis la unua ekzemplero de Nia Voĉo farita per komputilo. Marcos Cruz oferis sian komputilon por tajpi nian bultenon kaj li, kune kun aliaj esperantistoj, redaktos la revuon. Marcos anoncas ke, eble, dum kelkaj numeroj, la formaton kaj presliterojn oni ŝanĝos, ĝis ke la plej bona ŝajno por Nia Voĉo estu elektata. Oni akceptas sugestojn.

## VENONTAJ KONGRESOJ

Ekde la 16a ĝis la 23a de julio:

45a Internacia Junulara Kongreso en Kerkrade, Nederlando. (Pri ĉi tiu kongreso, estas originala sciigilo-aliĝilo en Rodriguez San Pedro 13, kiun oni povas fotokopii.)

Ekde la 17a ĝis la 23a de julio:

49a Hispana Kongreso de Esperanto en Bilbao.

Ekde la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto:

74a Universala Kongreso de Esperanto en Brajtono, Britio.

Ekde la 11a ĝis la 15a de oktobro:

7a Andaluzia Esperanto-Kongreso en Torrox, Malago.

## VENONTAJ PROGRAMOJ

**Ĉiulunde** okazos konversacia rondo je la 19a horo en Atocha 98.

La **29an de majo, lundo:**

Prelego (hispane) "Esperanto" de S-rino Francisa J. de Iruegas, ĉe "Asociaciòn Vegetariana Naturista", strato Santa Cruz de Marcenado 12 (apud strato Alberto Aguilera), je la 20a horo.

La **3an de junio, ŝaŭdo:**

Prelego "Elveno de vortoj en Esperanto" de S-ro J. M. Gonzàlez Aboin, ĉe Rodriguez San Pedro 13, je la 19a horo.

La **21an de junio, merkredo:**

Konversacia rondo "Amigos del Esperanto", ĉe Madrida Ateneo (strato Prado 21), je la 19a horo. Poste, **Lucrecia San Antonio legos siajn poemojn** ĉe "Casa de Guadalajara".

MADRIDA ESPERANTO LICEO INVITAS ĈIUJN GELERNANTOJN PARTOPRENI EN LA KONVERSACIA RONDO, KIU OKAZAS **MONATE ĈIUN TRIAN MERKREDON** EN LA MADRIDA ATENEO (STRATO PRADO 21) JE LA 19-A HORO.

**nia voĉo**
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

ekzempleroj: 100 **NIA VOĈO** Julio 1989

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

### * "RENOVAJ" MEMBROJ *

Dum tiu ĉi jaro ni rekaptis du gravajn antikvajn membrojn de MEL: D-ro Arranz [Aranz'], el Madrido, kaj P-ro Mulas, el Ciudarealo. Ni gratulas iliajn decidojn membriĝi denove al la Liceo, kaj esperas, ke la Liceo plaĉos ilin.

### * EKSTERLANDANINOJ EN MADRIDO *

El la fervojista kongreso en Salou venis al Madrido je la 17a de Majo du simpatiaj sovetunianinoj, kiuj pasis du-tri tagojn en nia urbo, akompanitaj de kelkaj madridaj geesperantistoj. Ili aĉetis kelkajn donacetojn en la centro de Madrido por siaj gefamilianoj.

### * PARTOPRENO EN FESTIVALO *

Je la 20a kaj 21a de Majo, Fernando Moral [Moral'] kaj Marcos Cruz [Markos Kruz] partoprenis festivalon "Piknetaria 89" [Piknetarja], kun malgranda tableto kvazaŭ stando; ili disdonadis esperantajn broŝuretojn kaj informis multajn homojn pri Esperanto.

### * TAGIĜEN *

Je la 3a de Junio, Marcos Cruz donis al la fama aŭtorkantisto Luis Eduardo Aute [Lujs Edŭardo Aŭte], en la Kulturcentro de Majadahonda [Mañadaonda], kie li inaŭguris eksposicion de siaj lastaj pentrajoj, amatoran tradukon de lia kanzono "Al alba" -Tagiĝe(n)-, kaj ankaŭ interesajn hispanlingvajn broŝurojn pri Esperanto. Aute estis tre afabla kaj montris veran intereson pri Esperanto, kiun li apenaŭ konis. Li parolis eĉ pri ebleco enmeti esperantan kanzoneton en venonta sondisko! Tio estus tre granda diskonigado de la Internacia Lingvo.

### * HELPU NIN! *


Ni intencas organizi la propagandon de niaj venontaj kursoj dum Septembro. Por tiu laciga kaj malaminda afero, ni bezonos vian tutan helpon, speciale por glui afiŝojn. Ni pensas, ke la kursoj devos komenciĝi la lastan semajnon de Septembro, por ke nia propagando ne estu videble samtempe kun alia de aliaj akademioj. Ni faros kune la propagandon de kursoj okazantaj ĉe Liceo kaj HEF-oficejo, kaj, se oni informas nin oportune por fari la afiŝojn, ankaŭ de aliaj.

### * PRELEGO DE S-RO ABOIN *

Je la 8a de Junio, en la HEF-oficejo, okazis tre interesa prelego de S-ro Aboin [Aboin'] al kelkaj geesperantistoj pri la elveno de esperantaj vortoj.

### * RENKONTIĜO EN PORTUGALIO *

Dum la dua semajnfino de Junio, oni celebris en Castelo Branco [Kastelo Branko] renkontiĝon de portugalaj esperantistoj. Kunvenis pli ol 70 gesamideanoj, inter ili 13 hispanoj kiuj venis el Mérida [Meri da] kaj Badajoz [Badaĥoz'] kaj ankaŭ kvin el nia grupo de Madrido. Oni parolis pri tre interesaj temoj de nia iberia movado, kaj ni povis konstati la viglan kaj junan movadon kiu nun ekzistas en nia najbara lando. Ĉiuj akordis plioftigi tiujn renkontiĝojn inter proksimaj urboj, speciale se partoprenos geeksterlandanoj.



...o de Esperanto ...azos en Perpignan (... ...o) ...
...mbro

...alenc... Regiono okazos en Alicante je ... ...a de

... ĈE MEL.

...konversacia rondo en nia sidejo, en strato Atocha

... ...nstruontoj dauriĝos en septembro ... kaj ... A. Garrote. Nur por antikvaj gelernanto... ...aros propagandilojn por la venonta baza kurso ...an de ...tobro. Do, ni bezonas vian helpon ... glui ... al la Liceo por disdoni laborojn.

## ...OR DISDONI AL LA GRUPOJ.

...istas akordo inter tiuj kiuj deziras iri al la ...ta en Kubo, precipe pri la postkongresaj ekskursoj ..., sed nur ene de la insulo mem). La aŭditaj ...oj ...iko, Nikaragvo, Usono (Disneyworld). Verŝajne, ĉio 350.000 pesetojn. Por malmultekostigi avia...lajn bone ke oni aranĝos nur ununuran ...jaĝon ...do en taŭgaj datoj por ke oni povu organizi mal...ajn ...ter Kubo. Bonvolu sciigi ĉi tiun aferon al la gr...poj, ...ĝantoj ke ili skribu al la madrida oficejo ... HEF: San Pedro 13-3-7, 28015 Madrido. La postkongres... organizos Juan Azcue'naga, la Liceo tiun al Fe..., kaj ... Astura Esperanto Asocio.

REDAKCIO: pro grava presila problemo, ne e... el pasintan numeron; plej frue kiel eble, ni ...

# VOĈO

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
ATOCHA nº 98. MADRID - 28012

NIA VOĈO
Organo de Madrida Esperanto-Liceo

oktobro de 1989

Ekzempleroj: 175

ESPERANTA NUPTO

Dennis Keefe, la aŭtoro de la metodo BEK, edziĝis la pasintan someron kun franca esperantistino de Tours. Ili restis kelkajn tagojn en Madrido invitite de Carmen Suarez. La novaj geedzoj loĝas ĉe Tours, sed eble translokiĝos al Hispanio.

ĤORO "VERDA STELO"

La esperanta ĥoro, kiun gvidas Pedro Vilaroig, partoprenis dum aŭgusto en la fama konkurso de "habaneras" kiu okazas ĉiujare ĉe Torrevieja (Alicante). Ĝia ludado en Esperanto estis tiel sukcesa, ke kelkaj radiostacioj intervjuis al Pedro kaj ankaŭ al Juan Carlos Ruiz, kiu kantis "sevillanas" en Esperanto.

HEF-RENKONTIĜOJ

La pasintan 16-an de septembro okazis ĉe la HEF-oficejo de Madrido ne-formala kunveno de la prezidanto, S-ro Alonso Núñez, kaj kelkaj geesperantistoj de Madrido kaj Vajadolido. Oni parolis pri la programo de HEF kaj pri la oficejo de Madrido.

La 29-an de septembro okazis alia kunveno, ĉe la madrida oficejo de HEF, de S-ro Alonso Núñez kun kvar esperantistoj. La prezidanto de HEF parolis pri siaj gravaj kaj interesaj ĵusaj proponoj al la Ministerio de Edukado. Temis interalie pri projekto por enkonduki Esperanton en lernejojn dum venontaj kvar jaroj.

EXPOLINGUA 90

La organizantoj kontaktis kun MEL ĉar ili estas interesitaj pri Esperanto por la venonta foiro. La opinio de MEL estas, ke devas esti HEF la partoprenonto, sed ne la lokaj grupoj, malgraŭ ke, pro tio ke la foiro okazos en Madrido, la organizontoj kaj deĵorontoj estas madridaj geesperantistoj. MEL atendas instrukciojn de la HEF-estraro.

ETAJ IMPRESOJ EL LA 45-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Alveninte tagon antaŭ la oficiala malfermo de la kongreso, mi troviĝis ĉe preskaŭ senhoma kongresejo. Kelke da nederlandaj gejunuloj finadis lastajn laborojn por la morgaŭa bonvenado al la kongresanoj. La ejo konsistis el konstruaĵaro, tute renovigita tre antikva monaĥejo nuntempe uzata por kongresoj kaj similaj.

Postan tagon, la alvenado de kongresanoj amasiĝis tre rapide ĝis la oficiala malfermo vespere; kelkaj centoj da homoj alvenintaj el malsamaj kaj, malproksimaj landoj kunvenadis ĉe unu el la konstruaĵoj, nomita "Centra Stacidomo" fare de la organizantaro, por aliĝi kaj poste disiriĝi al siaj loĝlokoj.

La inaŭguro estis unuflanke emocia sed aliflanke ridinda. Emocia pro tio kion ĉiu povas imagi, kaj ridinda pro tio ke ambaŭ geurbestroj (urbestrino de Kerkrade kaj urbestro de la tuj apuda germana vilaĝo) paroladis favore al Esperanto - sialingve! Ĉu ili ne havis sufiĉe da tempo, ekde kiam jam estis sciate ke Kerkrade estos la loko de la 45-a IJK, por lerni almenaŭ iom da Esperanto por la parolado? Ĉu, almenaŭ, ili ne povus esti lerninta la prononcadon de Esperanto por legi tradukon? Vere estis ridindegaj tiaj tradukendaj nederlandaj kaj germanaj paroloj kaj bondeziroj de geurbestroj pri la deziritinda internacia kompreniĝado per Esperanto. Tiam oni povis ekkompreni kial Esperanto tiom malrapide disvastiĝas!

Dum ses tagoj okazis multe da programeroj, precipe pri la ĉefa temo de tiu ĉi kongreso, tio estas transporto: prelegoj, konstruaj laboroj, filmoj, sportoj, ludoj, ekskursoj, koncertoj k.t.p. Sed precipe okazadis okulfrapanta miraklo kvazaŭ elirinta el bela sonĝo, tio estas reala interkompreniĝado inter homoj el tute malsamaj partoj de la mondo. Internaciaj grupoj kaj paroj, promenantaj kaj parolantaj, estis videblaj ĉie en la ejo kaj ĉirkaŭaĵoj dum la tuta tempo. Kiel Zamenhof mem jam diris okaze de la 1-a Universala Kongreso en 1905, ne estis alinacianoj sed nur homoj kun homoj.

Kun malsamaj lingvaj nivelo kaj klereco, sed kun sama ideo kaj emo, ĉiu ĉie partoprenis tiajn aranĝojn kaj programerojn kiajn plej ŝatis; eĉ tiuj ĉiamaj malagemuloj povis nur sunbani sub la malforta sed brila nederlanda suno, eble traserĉante verdajn tagajn stelojn super si en la ĉielo.

Je la fino de la kongreso, estis al ĉiuj videble, ke ne nur kongreso finiĝis, sed ankaŭ multaj konversaciadoj, enamikiĝadoj kaj eĉ enamiĝadoj! Multaj el tiuj "indaj adoj" probable denove renaskiĝos koresponde aŭ ĉe venontaj kongresoj, plifortigadante samideanaran interkomunikadon iom post iom ĉie sur la mondo.

De Markos

VENONTAJ PROGRAMOJ KAJ KONGRESOJ

Baza kurso: ĉe HEF-oficejo (strato Rodríguez San Pedro 13 3), marde kaj ĵaude de la 18-a kaj duono ĝis la 20-a horo.

Meza kurso: ĉe MEL (strato Atocha 98 4), ĵaude je la 19-a horo.

Esperanta kurso: de Francisco de Diego, ĉe Centro Cultural (strato Maestro Alonso 6, ĉe Ventas), merkrede de la 18-a ĝis la 19-a horo,

Prelego: "Uzi akuzativon estas facile", ĉe MEL, de Pedro A. Garrote, la 23-an de oktobro je la 19-a horo.

Konversaciaj rondoj: ĉe Ateneo (strato Prado 21), la 19-an de oktobro, je la 19-a horo; ĉe MEL ĉiu-lunde je la 19-a horo.

La 7-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos en Torrox (Malago) de la 12-a ĝis la 15-a de oktobro.

(NOTO DE LA REDAKCIO: ankoraŭ ne eblas presi bultenon kiel julian numeron; la presilon, kiu jam estas riparita, ni baldaŭ ricevos de la riparejo de Barcelono; venonta numero denove estos pli belŝajna.)

nia voĉo
LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
DOMICILIO SOCIAL Y REDACCION:
c/ ATOCHA n° 98 . MADRID - 28012

ekzempleroj: 175

# NIA VOĈO

Novembro de 1989

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

## Universala Kongreso en Brajtono.

Dum la pasinta Universala Kongreso oni elektis novan estraron de U.E.A. La nuna prezidanto estas S-ro John Wells el Britio, profesoro pri fonetiko en la Universitato de Londono.

U.E.A. provizore aprobis jenan liston de venontaj universalaj kongresoj: 1990 Havano, KUBO; 1991 Bergen, NORVEGIO; 1992 Prago, ĈEĤOSLOVAKIO; 1993 Valencio, HISPANIO. La hispana propono estis prezentata de S-rino Urueña, ĉar la valencia reprezentanto, S-ro Augusto Casquero, malsaniĝis kaj ne povis atingi Briton.

Denove gajnis hispano la belarta konkurso de U.E.A. En tiu ĉi jaro la gajninto estis Georgo Kamaĉo. Li ricevis la premion "Novan Talenton" pro la eseo "Originalaj romanoj en Esperanto: panoramo kaj perspektivoj".

Dum la kongreso oni lanĉis projekton pri Esperanto-hotelo, kiu malfermiĝos fine de 1990 en la bela germana montara urbo Herzberg ("Kormonto"). Por financi la projekton oni vendis (kaj vendas koresponde) akciojn de la propieta kompanio (registrita en Delaware, Usono). Ĉiu akcio kostas 500 usonajn dolarojn. Oni povas aĉeti "akcietojn" de po 5 dolaroj. Informoj el: Otto Kern, Juesholzstr. 38, D-3420 Herzberg.







## Kursoj en Madrido.

Je la komenco de oktobro oni inaŭguris kvin kursojn en la ĉefurbo: S-rino Lucrecia San Antonio gvidas bazan kurson ĉe HEF-oficejo, kiun partoprenas 18 gelernantoj; meza kurso estas gvidata de S-ro Ricardo F. Albert, kiu instruas ĵaŭde je la 19-a horo ĉe MEL; S-ro Fernando Moral instruas 3 gelernantojn ankaŭ ĉe MEL, lunde kaj merkrede je la 19-a horo; alian bazan kurson gvidas S-ro Francisco de Diego ĉe Centro Cultural, en la strato Maestro Alonso, numero 6, merkrede de la 18-a ĝis la 19-a horo; fine, S-ro Luis González gvidas ankaŭ bazan kurson ĉe Centro Puente de Toledo. Tiuj ĉi du lastaj kursoj estas por emerituloj.

**Universitata Kurso en Murcia.**

Danke al la monsubteno de la Universitato, la Esperantista Grupo de Murcia organizos Kurson por universitatanoj. Sukceson!

**Kristnaska loterio.**

MEL jam havas la numeron de la ĉefa premio: **50.157.** Ni bezonas vian helpon, speciale por vendi biletojn. Se vi deziras aĉeti unu, sendu ĉekon minimume 500-pesetojn(ekster Madrido, aldonu 165 pesetojn por banko-kostoj), kaj poste kaj poŝte ni sendos al vi la bileton.

**Zamenhofa bankedo.**

La kutima bankedo okazos la 16-an de decembro se ĝi estos noktomanĝo, aŭ la 17-an se ĝi estos vespermanĝo. Ankoraŭ ne estas elektita loko por ĝi. Ni informos en la venonta numero.

**Venontaj programoj kaj renkontiĝoj.**

**Ĉiu-lunde:** konvesacia rondo ĉe MEL (strato Atocha 98 4°) je la 19-a horo.

**15-an de novembro** (merkrede): konversacia rondo ĉe Ateneo, strato Prado 21, je la 19-a horo.

**18-an k. 19-an novembre:** 6-a Internacia Kultura Eo-Festivalo ĉe Issy-les-Maulineaux, proksime al Pariz-centro.

**27-an de novembro** (lunde): prelego de S-ro Juan Navareño pri participoj: ata, ota, ita. Atocha 98-4°

**9-an k. 10-an de decembro:** inaŭguro de Fundación Soler, en Valencio.

**Noto de la redakcio:** Estas videble, ke finfine denove la bulteno estas presita per la bona presilo, kiu ebligas tiajn ĉi presliterojn. Bedaŭrinde, eĉ post dua riparigo, la diabla presilo funkcias ne tute bone. Paciencon!

**Madrida Esperanto-Liceo**
Atocha 98 4°
28012 MADRID

ekzempleroj: 100

# NIA VOĈO


Decembro de 1989

Organo de Madrida Esperanto-Liceo

ESPERANTA MUZIKO

Nia ĥoro kaj orkestro "Verda Stelo" ludos dum la Kristnaska Mezo en la preĝejo "Santa Cruz" (strato Atocha, apud la Ministerio pri Eksteraj Aferoj". La 25-an de decembro je la 13-a horo.

**La jako**



1. surbrusta poŝo
2. maniko
3. poŝklapo
4. flankpoŝo
5. jaka subŝtofo
6. interna brustoŝtofo
7. roverso (refaldo)
8. butono
9. butontruo
10. jakokolumno

**Monumento al D-ro Zamenhof.**

La 27-an de junio oni komencis en Sabadell la preparajn laborojn por la starigo de monumento al D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu estos 12 metrojn alta.

**Uzi akuzativon estas facile.**

En oktobro, Pedro Garrote prelegis du tagojn pri la uzo de la akuzativo.

**Loterio de MEL.**

La lasta tago por aĉeti kaj pagi la biletojn estos la 18-a de decembro. La numero estas **50157.**

**Novaj libroj aĉetitaj en 1989.**

| | |
|---|---|
| 189- Curso práctico de Esperanto | |
| 202- La stultaj infanoj | J. Hess |
| 203- Esperanto simple por italoj | A. Ma. Matute |
| 207- El la "Verda Biblio" | de Fabreto L. |
| 212- Cuñatai pará | I. Lejzerowick |
| 219- Idealo kaj realo de internacia lingvo | |
| 220- Nguyen trai (vietnama poezio) | Hujucz |
| 221- Miguel Hernández, poeto de l' popolo | |
| 225- Sferoj 6 | Miguel Hernández |
| 228- Elektitaj versoj el la Sankta Korano | grupo NIFO |
| 231 Tamen, civilizitaj / Neĝbulo | |
| 232- La danĝera lingvo | C. Soldevilla |
| 238- Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ | U. Lins |
| 242- Curso de Esperanto, método Bilbao | B. Golden |
| 247- 75 aniversari del grup esperantista "Girona espero" | |
| 250- Analoj de la esperanta movado en Hispanujo, volumo 2-a | |
| | A. Marco |

| | |
|---|---|
| 252- La nigra insulo (aventuroj de Tinĉjo) | Hergé |
| 255- Esperanto, lerneja eksperimento | H. Sonnabend |
| 259- Esperanto, unu mondo, unu lingvo (kasedoj) | J. L. Santos |
| 273- Itinero je la nomo de Zamenhof | W. Sobolewski |
| 274- Manifiesto por la paz | J. Rapaso |
| 276- Vivi en Euskadi (videofilmo) | |
| 296- Pandemonio | HEJS |
| 297- Esperanto (Videofilmo) | Pola Esperanto-Asocio |
| 303- Esperanta bildvortaro | R. Eichholz |
| 310- Congreso Madrid 1987, coro (videofilmo) | |
| 311- Congreso Madrid 1987, (videofilmo) | |
| 316- Post 20 jarcentoj (videofilmo) | CEE |
| 317- La alta idealo | O. M. Airanhov |

**VENONTAJ PROGRAMOJ:**

**14-an de decembro:** Prelego de Ricardo F. Albert, "Esperanto kaj la hebrea lingvo: viviĝo kaj reviviĝo (komparo inter ambaŭ movadoj)." Je la 19:30 horo ĉe Rodríguez San Pedro 13 3° 7.

**Zamenhofa bankedo:** 17-an de decembro (dimanĉo), je la 14-a horo kaj duono ĉe "Casa de Guadalajara", Plaza Santa Ana 15 1°. Antaŭpago necezas, lunde ĉe MEL ĝis la 11-an de decembro (MEL-telefonnumero: 2308798). Prezo: 1.400 pes.

**Konversaciaj rondoj:** En la konversaciaj rondoj de decembro kaj januaro oni diskutos diversajn punktojn kaj proponojn por la venonta asembleo. Ĉiu-lunde je la 19-a horo ĉe MEL.

**Noteto de la tajpisto:** Mi volas klarigi ke mi ne havas komputoron "PC"; fakte, mi malEMas tiajn komputoraĉojn, kiuj regas, en la komputora mondo, same kiel la angla regas en la lingva mondo: nur pro sia monaĉo, ne pro sia propra valoro. Mi tajpas bultenon per komputoro **Sinclair QL**, multe pli potenca kaj malmultekosta ol PC-aĉo, sed bedaŭrinde multe malpli konata kaj uzata, tute same kiel Esperanto rilate al la angla. Ĉu komprenite?

**Madrida Esperanto-Liceo**
Atocha 98 4°
28012 MADRID

LICEO MADRILEÑO DE ESPERANTO
MEMORIA DE ACTIVIDADES DEL AÑO 1989
Sede social: Atocha 98 4º, 28012 MADRID

Como actividades màs importantes del año destacamos la estrecha colaboraciòn entre los dos grupos esperantistas existentes en Madrid: Liceo Madrileño de Esperanto y Federaciòn Española de Esperanto. También es digna de reseñar la tertulia "Amigos del Esperanto", que tiene lugar una vez al mes en el Ateneo de Madrid, cuyo actual presidente, Josè Prat, estudiò Esperanto en su juventud y apoya animadamente esta reuniòn de esperantistas.

A continuaciòn relacionamos las actividades llevadas a cabo durante el año 1989 por el Liceo Madrileño de Esperanto (Madrida Esperanto-Liceo, MEL).

**ENSEÑANZA**

La difusiòn del idioma Esperanto es el fin primordial de MEL. Por ello se han organizado cursos en los siguientes lugares:

- Sede de MEL;
- Centro Cultural de Mòstoles;
- Hogar del pensionista de RENFE;
- Oficina de la Federaciòn Española de Esperanto;
- Centro Cultural de la calle Maestro Alonso;
- Hogar del pensionista Puente de Toledo.

**CONFERENCIAS**

Siguiendo la costumbre de MEL, se han impartido conferencias sobre diversos temas, empleando siempre la Lengua Internacional:

- Muziko kaj desegno, de P. Vilaroig;
- Esperantaj filmoj, de J. Fernàndez Arroyo;
- Notoj pri la historio de la madrida Esperanto-movado, de L. Sanz Bueno;
- Diversaj kantoj flamenkaj, de J. Francisco Platas;
- Velàzquez, de P. Menèndez;
- Elveno de vortoj esperantaj, de J. Mª Ĝonzàlez Aboìn;
- Esperanto: lingvo neŭtrala, de F. Yruegas;
- Uzi akuzativon estas facile, de P. A. Garrote;
- Aktivaj kaj pasivaj participoj, de J. Navareño.

**PUBLICACIONES**

En este capìtulo destaca la ediciòn mensual del boletìn informativo "Nia voĉo" mediante ordenador, por primera vez en la historia de MEL.

La revista "Mujeres libertarias" publicò un amplio artìculo sobre el idioma Esperanto, enviado por un miembro de MEL.

Varios periòdicos publicaron un amplio reportaje sobre el Esperanto junto con una entrevista de la agencia EFE a la redactora de NIA VOĈO.

**PARTICIPACION EN CONGRESOS**

MEL ha estado representado por alguno de sus miembros o colaboradores en los siguientes congresos y encuentros:

- 41º Congreso Internacional de Ferroviarios Esperantistas, en Salou (Tarragona);
- 49º Congreso Español de Esperanto, en Bilbao (Vizcaya);
- 45º Congreso Internacional Juvenil de Esperanto, en Kerkrade (Holanda);
- 75º Congreso Universal de Esperanto, en Brighton

(Inglaterra);

-7ª Congreso Andaluz de Esperanto, en Torrox (Màlaga);

-Campamento Juvenil Esperantista, en Vitoria (Alava).

**OTRAS ACTIVIDADES**

-Se ha organizado en Madrid la Asociaciòn Madrileña de Ferroviarios Esperantistas (MEFA), como secciòn de la asociaciòn internacional correspondiente. Se compone principalmente de jubilados de RENFE.

-MEL fue el ~~el~~ anfitriòn de las reuniones de la directiva de la Federaciòn Española de Esperanto durante 1989.

-La "Sociedad Cervantina Madrileña" recibiò un ejemplar de "El Quijote" en Esperanto donado por MEL.

-Al Museo Lorquiano de Fuentevaqueros (Granada) se le hizo entrega de un ejemplar de "Bodas de sangre" y "La casa de Bernarda Alba", en Esperanto, traducciòn de un miembro de MEL.

-MEL participò con un quiosco informativo en la feria Piknetaria 89, organizada por el Ayuntamiento de Madrid.

-Se ha difundido el idioma Esperanto a travès de diversos programas de radio, en especial uno que emitiò la cadena COPE de una hora de duraciòn y en el cual, ademàs de esperantistas españoles, intervinieron telefònicamente esperantistas de Noruega y Australia.

-MEL ha continuado con su apoyo al coro y orquesta "Verda Stelo", que difunde el Esperanto por medio de sus actuaciones musicales.

-Los contactos con esperantistas de otras provincias y paises vecinos han sido abundantes: Marcha por el Canal de Castilla-Leòn, reuniòn con segovianos, participaciòn en reuniones con portugueses, y estancia en Francia en el castillo que posee la Asociaciòn Francesa de Esperanto.

-Varios esperantistas extranjeros visitaron Madrid y fueron acompañados por miembros de MEL. Australia, Polonia, URSS, Hungrìa, Cuba y Japòn fueron los paìses que nos visitaron.

-Las tertulias semanales en la sede de MEL, y una vez al mes en el Ateneo de Madrid, han servido para facilitar la pràctica de la Lengua Internacional a los nuevos alumnos.

-La actividad socio-cultural se ha continuado mediante visitas turìsticas y excursiones recreativas para socios y simpatizantes.

-El premio Klara Silbernik, patrocinado por "Hispana Esperanto-Muzeo", otorgado a aquella compañera de un esperantista español que haya apoyado con màs entusiasmo su labor por el Esperanto, recayò en un miembro de MEL, lo cual prueba el reconocimiento oficial de la labor que MEL, por medio de sus miembros, viene desarrollando ejemplarmente.

Madrid, diciembre de 1989

BORRADOR. Enviad comentarios antes del 31 de diciembre

G. Sanz Bueno
Vicesecretaria

J. Mª Gonzàlez Aboìn
Presidente